

Germana Esperantisto

Der Deutsche Esperantist

Oficiala organo de Germana Esperanto-Asocio — (G. E. A.) — kaj de aliaj Esperantistaj Unuiĝoj
Amtliches Blatt des Deutschen Esperanto-Bundes E. V. und anderer Esperantisten-Vereinigungen

Fondinto: J. Borel — Respondeca Redaktoro: G. Habellok

Enpresotaj artikoloj estas korektataj laŭ bezono. Neuzitaj manuskriptoj estas resendataj nur, se oni aldonis afrankaĵon por tio

Elvenas la 5an de ĉiu monato

Abonprezojn ktp. vidu ĉe la fino de l' tekstoparto

Erscheint am 5. jedes Monats

Bezugspreise usw. siehe am Schluß des Textteiles

28a Jaro No. 8/9 (426-27)

Redakcio: Deutscher Esperanto-Bund E. V., Johanniterstr. 9,
Berlin SW 61 - Administracio: Wilms-Straße 5, Berlin SW 61

Aŭg.-Sept. 1931

Enhavo: Pri la venonta Kalendar-reformo * 23a Universala Kongreso de Esperanto en Krakow * Inaŭguro de Zamenhof-monumento en Bad Reinerz (kun bildo) * Nationale Belange und Esperanto * Wie es nicht zu sein brauchte... und wie es sein sollte! * Für die Esperanto-Werbung * Esperanto-Movado * Esperanto-Kongresoj * Diversaj Komunikoj * Bibliografio * Esperanto-Institut für das Deutsche Reich * Mitteilungen des D. E. B. * Esperanto-Rundfunk-Programm * Anzeigen.

Pri la venonta Kalendar-reformo

De Ew. Brenken, Bochum

Unu el la plej gravaj problemoj de l' dudeka jarcento estas la kalendara reformo. La Ligo de Nacioj okupas sin jam de kelkaj jaroj per tiu ĉi problemo. Ĝi komisiis la naciligantan komitaton por komerco kaj trafiko, studi la kalendaran aferon kaj fari taŭgajn proponojn por reformado. El la preskaŭ 200 reform-projektoj, prezentitaj al tiu komitato, nur du estas akceptitaj de la Ligo de Nacioj. La decidan elekton faros internacia registara konferenco okazonta en Oktobro nunjara en Genève. Temas pri la du kalendar-proponoj de la amerika direktoro Cotsworth kaj de la germana diplom-inĝeniero Dro Rudolf Blochmann el Kiel. Sed antaŭ ol konatigi kun tiuj ĉi du plej bonaj kalendar-sistemoj, ni devas starigi la postulojn, kiujn la nova ĉiama kalendaro de l' estonteco devos plenumi.

Ĉiu vera reformo devas esti samtempe plibonigo al la ĝisnuna stato. Tial la nova kalendaro antaŭ ĉio devas eviti la mankojn de nia nuna Gregoriana kalendaro. La Gregoriana kalendaro ja estas, rigardata de pure scienca vidpunkto, preskaŭ senmanka kaj perfekta, ĉar ĝi — danke al la Gregoriana regulo pri kromtago el la jaro 1582 — por jarmiloj plej precize harmonias kun la astronomiaj indikoj de la sunjaro. La sunjaro de l' Gregoriana tempokalkulo ampleksas 365 tagojn, 5 horojn, 48 minutojn kaj 46 sekundojn, kaj tiu ĉi tielnomata meza tropika sunjaro restos ankaŭ estonte la scienca astronomia bazo de kiu ajn reformita kalendaro. Sed konsiderante la praktikajn bezonojn de l' ekonomia kaj administrada vivo, ni devas konstati, ke la Gregoriana kalendaro ne plu plenumas la postulojn de

la nuntempo pri simpleco, homogeneco kaj praktikeco, ke sekve ankaŭ ĝi devas submetigi al la ĝenerala raciigo de la moderna vivo. La plej grava manko de l' Gregoriana kalendaro estas la fakto, ke ĉiujare ĉiu dato (t. e. ĉiu kalendara tago) havas alian semajnotagon. La dua manko, kiu precipe koncernas la kristanajn popolojn, estas la ĉiujara variado de l' paska festo inter la 22a de Marto kaj la 25a de Aprilo, ĉar la kristana liturgio postulas, ke Pasko estu festata la unuan dimanĉon post la unua printempa plenumo.

La du ĉefaj postuloj por nova reformita kalendaro estas do

- 1) la koincido de ĉiu kalendara tago kun la sama semajnotago en ĉiu jaro;
- 2) fiksado de la paska festo je certa, difinita dato.

Kiel tria postulo krome aligas tiu, ke la nomitaj reformoj sub 1) kaj 2) estu farataj per minimuma ŝanĝo en la ĝisnuna Gregoriana kalendaro, por ke ne okazu kvazaŭa revolucio de la tuta socia kaj ekonomia vivo.

Ni rigardu nun detale la du supre menciitajn kalendar-proponojn de la amerikano Cotsworth kaj de la germano Blochmann kaj respondu al ni la demandon, ĉu kaj kiom ili plenumas la ĵus diritajn tri postulojn de bona taŭga kalendar-reformo.

La kalendar-sistemo de Cotsworth resume aspektas jene:

- a) La jaro dividiĝas en 13 monatoj kun po 4 semajnoj, t. e. 52 semajnoj kun entute 364 tagoj.

b) La 365a tago de l' jaro, t. e. la silvestra tago, havas nek daton nek semajnotag-nomon.

c) Ankaŭ la 366a tago de superjaro ne ricevas daton nek semajnotagan nomon.

Kio sekvas el tio? La lasta tago de l' jaro kaj la kromtagoj estas sen dato kaj semajnotag-nomo; tial ĉiu jaro konsistas el precize 52 semajnoj. Sekve ĉiu dato en ĉiu jaro koincidas ĉiam kun la sama semajnotago, t. e.: la unua ĉefa postulo de l' nuntempa industria kaj komerca vivo por nova kalendaro estas plenumita. Sed rilate al la fiksado de l' paska festo la propono de Cotsworth nenion decidas, kaj la subdivido de l' jaro en 13 monatojn kaŭzus malagrablan asimetrion por ĉiuj branĉoj de la praktika vivo. Precipe la komercistoj kaj librotenistoj spertus grandajn malfacilaĵojn por siaj kvaron- kaj duonjaraj bilancoj. Resume oni do povas konkludi rilate al la kalendar-reformo de Cotsworth, ke plibonigoj kaj malplibonigoj ekvilibras kaj sekve vera progreso rilate al la Gregoriana kalendaro ne estas konstatebla.*)

Kiel staras la afero pri la kalendar-propono de Blochmann? Ĝiaj fundamentaj principoj klariĝas el la sekvantaj 5 indikoj:

a) La ordinara jaro havas 364 tagojn aŭ 52 semajnoj kaj unu tagon sen dato kaj semajnotag-nomo, t. e. la tielnomata mezjartago inter Junio kaj Julio.

b) La kromtago, aldonenda al ĉiuj superjaroj, lokiĝas en la fino de l' superjaro kaj ankaŭ ne ricevas semajnotag-nomon.

c) Ĉiu dato estas en ĉiuj jaroj je la sama semajnotago, la 1a de Januaro ĉiam estas dimanĉo.

d) La unuaj monatoj de ĉiu jarkvarono (t. e. Januaro, Aprilo, Julio kaj Oktobro) havas 31 tagojn, la ceteraj monatoj 30 tagojn. (Ĉiuj jarkvaronoj havas do la saman simetrian strukturon. Ili havas po 3 monatoj aŭ po 13 plenaj semajnoj aŭ po 91 tagoj, kaj ili komenciĝas ĉiuj per dimanĉo. Ĉiu monato havas 26 labortagojn.)

e) La paska festo estas fiksata je la 99a tago de l' jaro, t. e. je dimanĉo, la 8a de Aprilo. (Sekve ankaŭ ĉiuj aliaj festoj, dependantaj de la paska festo, okazas ĉiam en la sama tago de l' jaro, ekzemple Pentekosto je la 26a de Majo.)

Ni vidas, ke ĉi tiu kalendara reformpropono de Blochmann forigas la malavantaĝojn de la Gregoriana kalendaro, plenumante la du ĉefajn, supre cititajn postulojn por nova kalendaro. Movigantaj ekleziaj festoj do ne plu ekzistas laŭ la kalendaro de Blochmann. Ankaŭ la tria supre starigita postulo rilate al minimuma ŝanĝo de la ĝisnuna stato estas plenumita; ĉar, konservante la dekdu-monatan jaron de la Gregoriana kalendaro, la propono de

Blochmann evitas la asimetrion de la dektrimonata jaro de Cotsworth kaj eĉ plibonigas la ĝisnunan simetrian de l' ekonomia jaro rilate al la egaleco de jarkvaronoj kaj jarduonoj. La kalendara reformpropono de Blochmann do meritas fariĝi la ĉiama kalendaro de l' estonteco. Efektive ĝi trovis jam ne nur la atenton de la Ligo de Nacioj, de la internacia gazetaro kaj de multaj eminentuloj el la rondoj de l' komerco kaj trafiko, de l' scienco kaj lernejo, de la jurscienco kaj oficistaro, sed ankaŭ la bonvolon de la Vatikano, kiu skribis jam en Aŭgusto de l' jaro 1925 al s-ro Blochmann la jenon: „Via propono havas la grandan avantaĝon, ke per ĝi estas ŝanĝate ne pli multe ol nepre necese.“

Kiun vidpunkton ni mem okupu rilate al la kalendar-reformo? Ni vidis, ke la propono de Blochmann superas tiun de Cotsworth laŭ praktikeco kaj simetrio. Kiel homoj juste pensantaj ni tial devas preferi la plibonon, t. e. la kalendar-sistemon de Blochmann. Sed ni estas ankaŭ germanoj, E-istoj kaj sekve grandparte pacaj batalantoj. Tial ni volonte subtenos ankaŭ la proponon de Blochmann, ĉar la aŭtoro estas nia samlandano kaj santempe amiko de E kaj favoranto de la mondpaĉo. Li uzas E-on por propagandi sian kalendar-sistemon en la tuta mondo, kaj li akcelas la mondpaĉon, proponante la mezjaran tagon de sia kalendaro kiel mondpaĉan tagon de la tuta homaro.

Por propagandi la „Ĉiaman kalendaron“ de Blochmann, formiĝis jam antaŭ kelkaj jaroj la „Gesellschaft zur Förderung der Blochmannschen Kalenderreform“ kun sidejo en Kiel, Lornsenstr. 24. Tiu ĉi „Societo por akcelado de la kalendar-reformo de Blochmann“ petas la aliĝon de ĉiu intereso kaj dissendas senkoste informajn presitaĵojn kaj propagandilojn en ĉiuj lingvoj inkluzive de E. Ĝi petas la subtenon de ĉiu homo konvinkita pri la boneco kaj praktikeco de la kalendar-reformo de Blochmann, sed precipe ĝi vokas ankaŭ al ĉiuj germanaj samlandanoj, al ĉiuj E-istoj kaj pacamantoj ĉiulandaj: „Helpu nin por venki!“

La konstanta, ĉiama kalendaro laŭ Blochmann

La	1	Januaro	Februaro	Marto
	2	Aprilo	Majo	Junio X
kvaronjaroj:	3	Julio	Aŭgusto	Septembro
	4	Oktobro	Novembro	Decembro X)
1	Dimanĉo	1 8 15 22 29	— 5 12 19 26	— 3 10 17 24
2	Lundo	2 9 16 23 30	— 6 13 20 27	— 4 11 18 25
3	Mardo	3 10 17 24 31	— 7 14 21 28	— 5 12 19 26
4	Merkredo	4 11 18 25 —	1 8 15 22 29	— 6 13 20 27
5	Ĵaŭdo	5 12 19 26 —	2 9 16 23 30	— 7 14 21 28
6	Vendredo	6 13 20 27 —	3 10 17 24 —	1 8 15 22 29
7	Sabato	7 14 21 28 —	4 11 18 25 —	2 9 16 23 30

X 31a de Junio; Mezjartago. XX 31a de Decembro; Kromtago en ĉiuj superjaroj.

*) La nunmonata kajero de „Esperanto-Praktiko“ enhavas specialan artikolon pri la reform-projekto de Cotsworth. Red.

23a Universala Kongreso de Esperanto en Kraków

1.—8. de Aŭgusto 1931

La 23a pasis, kaj por tion diri tuj, pasis kontentige. Ĉu ĝi same sukcesis kiel la 8a, la jubilea kongreso en 1912, en la sama urbo? Certe, se oni konsideras, ke la 23a kompare al sia antaŭulo estis forte „hendikepata“ (kiel iu konstatis en la malferma kunveno) per la ekonomia situacio en la tutmondo. Ĉis la lastaj tagoj la L. K. K. de Kraków ne povis esti certa, ĉu la kongreso povos okazi, ĉu la anoncitaj gastoj povos veni. Sed feliĉe la nuboj iom disigis, kaj alvenante la antaŭtagon de l' kongreso en la kongresurba stacidomo, ni trovis la Akceptejon en plena funkcio, stelumitaj policianoj servis al ni, ĉie en la urbo flirtis flagetoj en magazenaj fenestroj, honorpordego antaŭ la stacidomo salutis nin, kaj ni sentis nin hejme en la ĉefurbo de Esperantujo 1931.

Ke la urbo Kraków jam antaŭ la kongreso mem estis „E-igita“, estis — krome per la sistema klopodado de la Kraków-aj samideanoj — kaŭzita per la jam de dek tagoj funkciantaj kursoj kaj seminario de Andreo Ĉe; partoprenis pli ol 250 personoj, kaj la fina leciono montris bonajn rezultojn ĉe partoprenintoj de ĉiuj aĝoj kaj el ĉiuj medioj. Dum la kongreso la partoprenintoj de la Ĉe-kurso estis ofte rimarkeblaj pro kuraĝa uzo de nia lingvo.

La Akceptejoj ktp. estis en la samaj ĉambroj de la Komerca Akademio kiel 1912, simplaj, tamen praktikaj ejoj; en la sama konstruaĵo okazis ankaŭ la kunsidoj de I. C. K., K. R., Generala Estraro kaj multaj fakunsidoj. La sidado sur lernejoj benkoj, kiuj knarante obstrukciis kontraŭ la troa pezo de la kunsidantoj, ne estis tre agrabla, tamen ne malhelpis diligentan laboron.

Kongresdokumentoj konsistis el bele presita Kongreslibro en praktika formo, riĉenhavaj gvidlibroj tra Kraków kaj Pollando; la kongresinsigno montris en plaĉa formo la turojn de la kongresurbo ĉirkaŭ la verda stelo.

La Malferma Soleno

okazis jam sabaton, 1. 8., en la bela ĉambrego de la nova „Katolika Domo“. La podion ornamis bildo de nia Majstro Zamenhof, ornamita per E-flago kaj florkrono kun rubando en la polaj koloroj. La ĉambrego baldaŭ plenigis, verŝajne la plej multaj el la preskaŭ 800 registritaj kongresanoj — ĉiuj bedaŭrinde eble 100 pro la krizaj cirkonstancoj de siaj landoj ne povis veni — ĉeestis. Sur la podio la Prezidanto de I. C. K., s-ro Merchant, la Sekretario-Kasisto de K. R., s-ro Schoofs, la Direktoro de I. C. K., s-ro Kreuz, gvidis la aferojn, helpataj de Kraków-aj samideanoj; ĉirkaŭ la prezidantaro sidis la reprezentantoj de la naciaj asocioj. Orkestro ludis preludon kaj poste la polan nacian himnon, la Prezid-

into de la Oxford-a Kongreso, Prof. Long, transdonis la prezidantecon de la 23a Kongreso al Prof. Bujwid, kiun la ĉeestantaro ĝoje akklamis. Sekvis la laŭforma elekto de la Vicprezidantoj de la kongreso, Sekretarioj ktp., kaj la nomigo de la Rektoro de Jagelona Universitato, Prof. Zaleski, kiel Honora Prezidanto de la 23a.

Prof. Bujwid salutis unue kaj poste en E la honorajn gastojn kaj la E-istaron, skizis iom la antaŭhistorion de la kongreso kaj deziris al ĝiaj laboroj bonan sukceson. S-ro Merchant dankis al la L. K. K. de l' 23a, speciale al la nelacigebla (tamen vid-eble lacigita) Prof. Bujwid, menciis la meritojn de tiuj samideanoj, kiuj forigis de ni dum la pasinta jaro, speciale Prof. Cart kaj Dro Sós. Li atentigis pri tio, ke malgraŭ malfavoraj cirkonstancoj en la tuta mondo nia movado marŝas kaj ke ne estas kaŭzo por esti pesimisma; li esprimis la esperon, ke ĉefe flanke de la malgrandaj landoj, kies lingvoj ne estas oficiale uzataj internacie, venu instigoj al la Ligo de Nacioj kaj aliaj kompetentaj gvidantaroj, uzi E-on kiel helpan lingvon. Fine s-ro Merchant menciis la laborojn de niaj agantoj sur specialaj kampoj: Radio — s-ro Jungfer, Gazetaro — s-ro Avril, Instruado — Pastro Ĉe (kiu ricevis senfinan aplaŭdon), E-Muzeo — s-ro Steiner, Generala Propagando — s-ro Kreuz, fine s-ro Scherer, la mondvojaĝanto per kaj por E. Alvoko al kuraĝa daŭrigo de nia laboro finis la instigan paroladon multe aplaŭdatan.

Sekvis salutoj de la oficialaj gastoj: Viovojevodo Bilek, rektoro Zaleski kaj vicurbestro Klimecki; ili parolis pole, iliaj salutoj kaj deziroj estis en E konigataj pere de Kraków-a samideano. Same salutis kaj bondeziris la kongreson reprezentantoj de la registaroj de Aŭstrujo, Germanujo (ambaŭ vickonsuloj mem partoprenis, tiu de Aŭstrujo eĉ parolis en E), Lihtenŝtejno, Holando, Hungarujo, Norvegujo kaj Rumanujo; krome parolis la komisiito de la urbestro de Zamenhof-a naskiĝurbo Bialystok.

Post kelkaj reprezentantoj de specialaj grupoj (Skoltoj, Zionistoj ktp.), de la Internacia Laboroficejo en Genève k. a. sekvis la salutoj de la reprezentantoj de naciaj asocioj kaj de la Vicprezidanto de U. E. A., s-ro Karsch, kiu esprimis la esperon, ke la du kolonoj de nia organizo: Naciaj Asocioj kaj U. E. A., en la nuna kongreso kaj ĉiam povu akorde kaj sukcese kunlabori.

Prof. Bujwid dankis al ĉiuj parolintoj, kiuj cetere limis sin tiom, ke eble la unuan fojon en la historio de niaj kongresoj la malferma kunveno povis finiĝi je la intencitaj horo kaj minuto per kanto de nia himno kun akompano de la orkestro, kiu en la kunveno jam ludis la melodion de „Tagiĝo“.

Je la 22a ni devis esti en la

Interkonatiĝa vespero

en Malnova Teatro. Ni estis kaj interkonatiĝis kun multaj malnovaj amikoj kaj trovis novajn; multaj uzis la plej agrablaman manieron de interkonatiĝo: la dancadon, kaj ili bone sukcesis tiel.

Dimanĉon matene

Diservoj.

Mi ne povis partopreni tiun en la evangelia preĝejo, ĉar mi ne ĝustatempe trovis la vojon tien. En la katolika diservo en Maria-katedralo Pastro Ĉe celebris meson, belaj solkantoj akompanis ĝin. Predikon faris pola pastro-samideano pri la parabolo Farizeo kaj Doganisto. Poste la multnombra ĉeestantaro kolektiĝis kaj marŝis al la nova

„Zamenhof-strato“,

kie post parolado de la urbestro de Kraków la nomŝildo kaj memortabulo estis malkovrataj. La marŝo estis daŭrigata ĝis la kastelo Wawel; tie oni fotografis sin reciproke kaj fine nin ĉiujn oficiale. Posttagmeze la kongresanoj veturis per aŭtobusoj al arbareto proksima apud Kraków, por ĉeesti

oratoran konkurson.

Venkis en ĝi la vere tre elokventa Pastro Font Giralt el Katalunujo, kiu cetere dum la tuta kongreso estis multe atentata persono pro sia vigla kaj aminda maniero. La duan premion ricevis s-ro Tiberio Morariu.

Lundon matene komenciĝis la laboro, kaj fakte oni devas konstati, ke en tiu kongreso oni malpli amuziĝis ol serioze laboris, same en la laborkunsidoj kiel en la diversaj fakkunsidoj.

La

Unua Laborkunsido

alportis, post invito de s-ino Isbrücker al aparta kunveno de la Ĉe-Instituto, diversajn diskutojn pri la rajto de minoritataj E-Asocioj rilate al ilia reprezentado dumkongresa, kaŭzita de la nepermeso al ukraina reprezentanto, paroli en la malferma kunsido, kaj la diskutadon pri la Kongresa Raportaro. Bedaŭrinde tiu sufiĉe ampleksa presajo nur tiel malfrue povis esti dissendata, ke la plej malmultaj kongresanoj ĝin ricevis antaŭ sia forvojaĝo. Do s-ro Kreuz devis resumi la raporton de I.C.K., same s-ro Schoofs tiun de K.R.; s-ro Karsch invitis por preparolado de la raporto de U.E.A. al speciala U.E.A.-kunveno. Pri la raportoj ne okazis longa diskutado, ĉar ja mankis la necesa preparo, tiom pli viglaj fariĝis la diskutoj post la parolado de s-ro Jan Fethke pri E-propagando per filmo, do pri temo fakte aktuala. Montriĝis, ke la opinioj pri la plej taŭga maniero tre varias, kaj ke estas necese, ke fakuloj sin okupu pri tiu tasko.

Lundon posttagmeze okazis krom diversaj fakkunsidoj laŭprograme la malfermo de la Somera Universitato.

Domage, ke la pli granda nombro de la anoncigitaj prelegantoj ne povis veni, tiel limiĝis la tuta programo de la Somera Universitato al prelegoj de s-ro Pitlik el Praha, pri „Metodoj de sukcesa turisma informado kaj gvidado al eksterlandanoj“, kaj de s-ro Scherer pri lia mondvojaĝo (kun demonstracio de belegaj lumbildoj). Estas tre bedaŭrinde, ke la ideo de Somera Universitato nunjare tiel devis fiaski, speciale pro tio, ke s-ro Bujwid estis farinta multan preparan laboron.

Krome en tiu tago kunsidis *Komitataro kaj Ĉefdelegitoj de U.E.A.* kaj poste la *Generala Estraro de la E-movado*, farante internan, sed ne malpli gravan laboron, diskutante pri multaj demandoj de propagando, defendo kontraŭ atakoj de kontraŭuloj ktp.

La vesperoj de lundo kaj mardo donis al po unu duono de la kongresanoj okazon, aŭdi

internacian koncerton

en la ĉambrego de Malnova Teatro. Internacia estis la koncerto laŭ la programo, kiu nomis verkojn de komponistoj de plej diversaj nacioj, ilin prezentis art-kantistinoj kaj -kantistoj de la opero el Lwów kaj kantunuĝo (virhor) „Eho“ el Kraków. La solkantoj estis kantataj en pola lingvo, kelkaj el la ĥorkantoj estis en E. La tuta arango estis inda kaj bela, ĝi estis ambaŭfoje vizitata ankaŭ de ne-E-ista publiko, kiu tiumaniere konatiĝis kun la kongresanaro.

Lundon vespere (antaŭ la koncerto) la

Internacia Ĉe-Instituto

invitis al la Industria Muzeo por parolado de s-ino Isbrücker pri la Instituto kaj la E-Domo en Arnhem. La ĉambrego estis plenplena, kaj la ĉeestantaro kun intereso aŭdis priskribon de la fondiĝo de la Ĉe-Instituto, la oelojn de ĝi kaj de la E-domo, la tieajn arangojn, la lotieron por ĝi kaj fine kun ĝojo vidis la bildojn el Arnhem, kiujn klarigis s-ro Ĉe en ĉarma maniero. Generala estis la kontentiĝo pri la nova pliriĝo al nia movado per Andreo Ĉe kaj liaj fidelaj helpantoj nederlandaj.

La mardo estis plene dediĉita al

fak-kunsidoj;

multaj fakuloj havis siajn kunvenojn same kiel jam lundon, ekzemple la Katolikoj, Blinduloj, I.L.E.P.T.O., U.D.E.V., Alstinenculoj, Literatura Mondo, Pacifistoj, Interniario, Studentoj, T.A.G.E., Nefumantoj, Bahaanoj, Internacia Scienca Asocio, Heroldo, Oomoto, Radio kaj Unio Homara. Laŭ mia observo almenaŭ tiuj kunsidoj, kiuj havas firman organizaĵon malantaŭ si, estas bone vizitataj, dum kelkaj devis konsoli sin per la malnova sentenco, ke „tri faras kolegaron“.

La plej grandnombra kunveno de mardo estis tiu de

Universala Esperanto-Asocio

en Industria Muzeo, kies ĉambrego estis plenigata de 200 ĝis 300 kongresanoj. Prezidis la Vicprezidanto de U. E. A., s-ro Karsch, kiu salutis la kunvenon, konatigis elekton de s-ro Kudela, Olomouc, kiel Honora Membro, esprimis dankon al s-ro Scherer, kiu, uzante la servojn de U. E. A. dum sia mondvojaĝo, servis al U. E. A. mem, kaj transdonis al li E-horloĝon kun dediĉo. S-ro Scherer dankis ĝojgite kaj koncize raportis pri siaj plejparte bonaj kaj eĉ tre bonaj spertoj kun la Delegitoj de U. E. A. dum sia vojaĝo. Starante la kunveno aŭdis la longan liston de tiuj membroj, kiuj dum la lasta jaro mortis, la Vicprezidanto menciis iliajn meritojn kaj la Direktoro de U. E. A., s-ro Jakob, aldonis specialajn notojn al la diversaj nomoj. Poste s-ro Jakob resumis la jarraporton de U. E. A.; diskutado respegulis la ĝeneralan kontentecon de la anoj pri la sintenado de la estraro kaj la konvinkon pri la neceseco de forta kaj memstara U. E. A. Plendoj kaj kritikoj ne aŭdiĝis. En la dua parto de la kunveno la Vicprezidanto raportis pri la laboroj de Turisma Servo, Germana Sekcio, de U. E. A.; liajn sciigojn kompletigis s-roj Pitlik el Praha, Steiner el Wien, Brauer el Tallinn, Canuto el Milano kaj aliaj per raportoj pri siaj specialaj spertoj. Montriĝis, ke la turisma kampo estas grava kaj pli ol aliaj medioj oportuna por montri al ne-E-istoj la praktikan utilon de E.

La

Dua Laborkunsido

de la kongreso okazis merkredon antaŭtagmeze en Katolika Domo; ĝi estis same kiel la aliaj kontentige vizitata, eble 300 personoj ĉeestis, kio signifas pliboniĝon kompare al antaŭaj kongresoj. Anstataŭ la neveninta s-ro Avril el Nice, s-ro Sapiro el Bialystok donis la raporton de la gazetara komisiono, kompletigante ĝin per propraj spertoj. La diskuto montris diversajn manierojn, gajni la gazetaron kaj atingi ĝin al nia propagando. Poste s-ro Jung el Köln parolis pri Centriĝo de la gazetara informado pri E, komparante la gazetaran servon de I. C. K. kun la rapida informado pere de Heroldo. En diskuto montriĝis, ke malgraŭ la malfrua apero de I. C. K.-gazetinformoj por kelkaj celoj ili tamen estas dezirindaj. La lastan paroladon de tiu riĉenhava laborkunsido faris s-ro Karsch el Dresden pri „Vojoj kaj metodoj de apliko de Esperanto por turisma reklamo“. Li resumis siajn proprajn kaj la spertojn de aliaj laborantoj sur tiu kampo kaj alvokis al intensa kunlaboro. Mallonga diskuto substrekis la montritan gravecon de tiu praktika propagando. — La finon de tiu kunveno faris prezentado de sondisko pretigita de katalunaj samideanoj laŭ vaksilindroj surparolitaj de Dro Zamenhof en la jaro 1909 en Barcelona. Kvankam la reprodukto ne plene sukcesis, oni tamen

kun emocio aŭdis ĉe diversaj partoj de la disko la voĉon de nia Majstro tute klara kaj dankis al la iniciatintoj per kora aplaŭdo. Poste la disko eldonita de K. E. U. aŭdigis kun bona sukceso la E-himnon.

Speciala ĝuo atendis la kongresanaron merkredon vespere. Estis anoncita

„Festivalo“

en la korto de la kastelo Wawel; multaj estis la ŝeroj pri tiu vorto — tiom pli bela la afero mem estis. La granda korto de la majesta kastelo kun ĝiaj logioj kaj galerioj en pura itala stilo brilis en blanka lumo kaj formis sub nigre-blua ĉielo koncert-ĉambregon de unika beleco. Kaj ĝin plenigis la kongresanoj kaj multaj gastoj, ĉiuj aŭdis kun streĉita atento polan muzikon, prezentata de solistoj, ĥoro kaj granda orkestro. Operon nunjare ni ne havis, sed tiu muzikfesto donis plenan ekvivalenton, speciale ĉar parto de la koncerto konsistis el muzikajoj el la opero „Halka“, kiun oni ĝuis en la Kraków-a Kongreso de la jaro 1912.

La jaŭdo servis ree al

fakkunsidoj,

la plej grava estis tiu de Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio en la Kuracista Domo. Tie, post saluto de la Prezidanto de T. E. K. A. kaj esprimo de bondeziroj de I. C. K. kaj U. E. A. pere de iliaj reprezentantoj, Dro Blassberg el Kraków faris prelegon pri la Universitato de Kraków, Prof. Canuto el Milano parolis pri kriminalaj demandoj medicinaj; diskuto pri la celoj de T. E. K. A. finis la interesan kunvenon.

Preskaŭ je la sama horo okazis en granda kinoteatro matena prezentado de Literatura Mondo, en kies kadro paroladis kaj deklamis f-ino Lydia Zamenhof, s-roj Baghy, Ĉe, Font Giralt, Fethke, Sturmer kaj aliaj kaj trovis varman komprenon kaj aplaŭdon.

La

Tria Laborkunsido

okazis vendredon antaŭtagmeze; ankaŭ ĝi havis multnombrian partoprenantaron, kiu aŭdis la raportojn de la Akademio kaj Lingva Komitato kaj akklamis vigle la ĵus elektitan Prezidanton de la Akademio, s-ron Warden el Edinburgh. Sekvis parolado de la nova gvidanto pri „Elparolado de Esperanto“, en kiu li kompletigis la referatojn el la pasintjaraj kongresoj pri la sama temo, fine s-ro Schoofs legis paroladon de s-ro Höke el Elberfeld pri „Esperanto kaj Stenografio“. S-ro Kreuz skizis la manieron, kiel ni povas fari nian propagandon pli efika (per montri de faktoj ekzemple) kaj respondis la demandon, ĉu E progresas, en tiu senco, ke tio estas konstatebla en multaj rilatoj kaj donas esperon, ke tiu progreso daŭros kaj kondukos al la celo de nia laboro, al celo, kiun la mondo same bezonas, kiel ni mem tion scias de post la apero de E.

Posttagmeze kelkcenta anaro verdstelumita veturis fervoje al

Wieliczka

por viziti la malnovan kaj fame konatan salminejon tiean. En la stacidomo de la minejo salutis nin muziko de ministroj, infanoj transdonis florojn al la sinjorinoj, salutparoladis la urbestro de Wieliczka kaj la direktoro de la minejo, ĝoje memorigante pri la vizito de la E-istoj en 1912. Post fotografado (bone, ke esti fotografate, ne kaŭzas dolorojn!) ni enveturis en la ŝakton. Ni migris tra senfinaj koridoroj, admiris ĉambregojn, preĝejon kaj katedralon kun altarstatuoj el salo, kaj fine kunestis ĉiuj en ĉambrego 300 metrojn sub la terfaco por manĝi, trinki, vidi belajn dancojn de infanoj en polaj kostumoj kaj por mem danci. Stranga amuzo, tiel profunde en la sino de nia terglobo, tamen menu multet meditis pri tio, sed uzis la ŝancon donitan.

Cetere — menciante la dancadon en la minejo, kiun ni forlasis ĉirkaŭ vesperigo, mi memoras, ke mi forgesis el la aranĝoj de jaŭdo ĵun tre gravan: la

Kongresbalon

en la Malnova Teatro. Ĝi komenciĝis je la 22a, sed ĝi estis vere bela festo: du orkestroj ludis bonege, oni havis multan okazon por danci, oni vidis multajn belajn naciajn kostumojn, okaze de premiado de la plej bela kostumo ricevis la unuan premion ĉarma bulgarino, la duan reprezentantinoj de la belaj Budapeŝt-aninoj kaj la trian samlandanino de „Fraŭlino Esperanto 1929“, do estonino; ili plene meritas tiujn premiojn same kiel multaj aliaj kostumoj meritis la konsolajn premiojn kaj laŭdajn menciojn kaj ĉiuj la admiron kaj aplaŭdon de la rigardantoj. En dancaŭzoj montris sin baletdancistaro de la opero el Lwów en diversaj naciaj dancoj, kaj la Danzig-aj gesamideanoj prezentis germanajn dancojn de „Wandervogel“ (migrantaj birdoj) tre belajn, sed tamen ne taŭgajn por ĉambrego; kiam ili dancis en la arbaro okaze de la oratora konkurso, ili pli bone efikis. Tamen ankaŭ al ili dankis laŭta kaj kora aplaŭdo.

Sabaton — kongresfino. Multaj jam foriris, tamen eble 500 personoj ĉeestis en la

Ferma Kunsido

en la Katolika Domo. S-ro Merchant dankis al ĉiuj, kiuj iel helpis aranĝi la kongreson, s-ro Bujwid redonis la dankon al la gastoj kaj menciis speciale la subtenon de la registaro kaj urbeŝtraro; li petis, forgesi tion, kio ne povis esti tiel, kiel oni ĝin deziris, kaj memori ĝin, kio plaĉis al ĉiuj. Neĝoce s-ro Merchant publikigis la decidon, estonte festi kiel tagon de la apero de nia lingvo la 2an de Junio, t. e. la tago, en kiu en 1887 la cenzuro permesis la eldonon de la unua libro. Oran medalon I. C. K. decidis doni nunjare al Prof. Christaller, al la Germana E-Instituto kaj al la familio Zamenhof, kies membroj ĉi-tiu-

foje senescepte ĉeestis la kongreson kaj estis multe ovaciataj. Nome de ili parolis s-ro Felikso Zamenhof en senco optimisma, kuraĝiga. En la nomo de U. E. A. la Vicprezidanto s-ro Karsch esprimis dankon al la kongresgvidantaro kaj sciigis, ke la komisiono de U. E. A. decidis nomi Prof-on Bujwid honora membro de U. E. A. pro liaj meritoj pri nia movado kaj lia fideleco al nia Asocio. Dankis krome s-ro Schoofs al s-ro Merchant por lia ĉiam bonintenca gvidado de la kunvenoj, s-ro Hasselbach el Berlin nome de la Blinduloj por ĉiuj komplezoj, kiujn oni faris al ili dum la kongreso, s-ro Kreuz por la mencio de sia laboro pere de s-ro Merchant — kaj tiel finiĝis la kongreso per la krio „Ĝis revido en Paris-o — Vivu Kraków — Vivu Esperanto!“ kaj per kantado de la himno.

Finiĝis la 23a — kaj restas al la germana raportanto pri ĝi nur la tasko, danki, kiel tio jam okazis surloke, ankaŭ ĉi tie por la laboro de la tuta L. K. K. de Kraków, kiu sub gvidado de Prof. Bujwid kaj de la Sekretario de la 8a, la sperta s-ro Rudnicki, plenumis ĉion plenumeban malgraŭ malbonaj kondiĉoj. Dankon al ĉiuj membroj de L. K. K., speciale al tiuj sinjorinoj, kiuj deĵoris en stacidomo kaj Akceptejo por loĝigi ĉiujn laŭdezire, speciale al s-ino Neuberg, al ĉiuj gesinjoroj, kiuj klopodis pri aranĝoj, ekskursoj ktp., dankon al ĉiu samideano kaj samideanino de Kraków, kiu helpis nin, se fiakristo ne komprenis E-on aŭ se la E-scio de kelnero ne plene sufiĉis por kompreni niajn dezirojn (kvankam multaj el tiuj servantoj bonege uzis la lingvon kaj — kiel mi observis en preferata manĝejo de la kongresanoj — eĉ inter si parolis en nia lingvo). Ni deziras al la Kraków-aj gesamideanoj, ke la semo, kiun ili okaze de la kongreso metis en la urbon kaj ĝian loĝantaron, kresku kaj valorigu ilian multan laboron!

Ke

post la kongreso

Ĉien flugis kongres-ekskursoj, ni notu rapide: bele sukcesis la ekskurso al Zakopane kaj Morskie Oko, kiu, bone organizita, en la unua tago ankaŭ havis belan veteron, dum en la dua tago bedaŭrinde multe pluvis; pri la postkongresoj en Warszawa kaj Białystok ni ne havas ĝis nun raportojn, sed supozas, ke post la bonaj preparoj ankaŭ la tieaj aranĝoj same sukcesis kiel tiuj, kiuj estis projektitaj en Budapeŝt kaj en Reinerz (Silezio). Multaj, tro multaj, tiuj postkongresaj aranĝoj, kiuj sin reciproke malutilis videble; konsilinde estas, estonte aranĝi nur en unu loko postkongreson, kiu tiam estos vere taŭga propagando. Kiel ni aŭdis, la sola antaŭkongreso en Breslau estis vizitata de proksimume 100 personoj kaj faris bonan impreson de publiko kaj oficialuloj, dankinda entrepreni ĝuste pro sia modesteco kaj limigo je nur unu loko.

Kaj nun: ĝis revido en Paris 1932! Ni esperu, ke la cirkonstancoj tutmondaj ĝis tiam pliboniĝu kaj ke estu nia venontjara mondfesto de E epokfaranta kaj fruktodona en vasta senco!
J. K.

Inaŭguro de Zamenhof-monumento en Bad Reinerz



Hazarde en la sama tago, kiam oni enmetis la fundamentan ŝtonon de la Bialystok-a Zamenhof-monumento, la Sileziaj E-istoj kunvenis en Bad Reinerz, por soleni la inaŭguron de la unua Zamenhof-monumento en Germanujo.

Pro kio ĝuste en Banloko Reinerz?

Reinerz estas fame konata kuraĉloko por kormalsanuloj. Ĉi tie Zamenhof serĉis en la jaroj 1906 kaj 1909 resaniĝon. Ambaŭfoje li loĝis en la vilao „Metropole“. La 2an de Aŭgusto 1909 vizitis la Majstron Sileziaj E-istoj. Oni aranĝis malgrandan feston.

En la jaro 1911 Prof. Dro L. Huebner el Schweidnitz, nuna honormembro de G. E. A., proponis kiel la unua, starigi memorŝtonon en Bad Reinerz, kaj interrilatis pro tio kun la magistrato. Sed la mondmilito malebligis la efektivigon de la de-

ziro. En la printempa kunveno de la Silezia Ligo E-ista en Schweidnitz, la 2an de Majo 1923, oni decidis fondi Monumentan Kason. La tiam a ligi-estro, s-ro Georg Habellok el Breslau, la nuna afergvidanto de G. E. A., komencis kolekti monon, sed la inflacio forrabis preskaŭ ĉion. Dum la printempa Ligo-kunveno 1928 en Habelschwerdt oni rekomencis la kolektadon. La ĉiam fervora kaj neniam laca tiam a fer-gvidanto de la Ligo, s-ro K. Kliem el Löwenberg, transprenis denove la mon-kolekton por efektivigi la multjare nutritan deziron. En ĉiu kunveno, ĉu en ĉu ekster Silezio, li kun ĉiam bonhumora mieno rondirigis la konatan ŝparkeston. Markoj post markoj, groŝoj post groŝoj kolektigis en ĝi, ĝis kiam fine la dezirita sumo estis atingita. En la ĉefkunveno de la Ligo 1930 oni elektis Monument-komisionon.

En 1931 estas pasintaj ĝuste 25 jaroj de post la tempo, kiam nia altestimata Majstro estis la unuan fojon en Reinerz, en tiu plej bela banloko de Silezio. Do la komisiono decidis, starigi la monumenton post la Kraków-a Kongreso, la 16an de Aŭgusto 1931. Sekvis longaj kaj tre malfacilaj preĝaroj. S-ro Kliem intertraktadis kun la magistrato, kies estro estas urbestro Dro Goebel, akcelanto de nia movado. Multaj, eĉ nur en la plej lastaj tagoj estigintaj malfacilaĵoj devis esti venkitaj, sed la persistemo de s-ro Kliem majstris ĉion kontentige.

La tago de la inaŭgura festo estis veninta. Antaŭvespere jam multaj gastoj venis en ĉi tiun benitan angulon de Silezio, eĉ kelkaj el eksterlando. Akceptejo funkciis en la stacidomo. Ĉiu alveninto ricevis dikan koverton kun festdokumentoj. Preskaŭ ŝajnis, ke estas E-mondkongreso en Reinerz! Sur la stacidoma placo flirtis du grandaj E-flagoj alte super la pitoreske situanta urbeto. Sed pluvis, kiam ni sekvis la bone flegitan vojon en la banlokon. Grizaj nuboj pendis je la deklivoj de ambaŭ flankoj de la malvasta valo. Ĉu la vetero malhelpos la venontdimanĉan feston? Multajn gesam-ideanojn maltrankviligis tiu demando. Sed kiam dimanĉon matene la plej belega sunradio disigis la nubtegmenton super la mont-arbaroj, tiam ekestis en ĉiuj koroj vera festoĝojo.

La aŭtuna kunveno de Sileo, kiu okazis antaŭtagmeze, estis la ĝis nun plej bone vizitita; la elokventa f-ino Skarsetz el Waldenburg donis en sia parolado pri „Edukado al popolpacigo — etika tasko“, oratorajn. S-ino Boettcher, la tre ŝatata „E-patrineto de Graflando Glatz“, babilis gajige pri la travivaĵoj dum la Kraków-a kongreso. La kunvenon partoprenis ankaŭ la urbestro Dro Goebel kaj s-ro Postrat Behrendt el Berlin, prezidanto de G. E. A. S-ro Behrendt memorigis pri sia renkonto kun nia Majstro en Bad Reinerz en la jaro 1909, kaj la urbestro kore bon-

venigis la ĉeestantojn, dezirante al nia movado plenan finvenkon.

En plena sunlumo kolektiĝis la festantaro je 11.30 h. sur la placo antaŭ la vilao „Metropole“. Tie staras la monumento, du metrojn alta kruda ŝtonego kun la epigrafo:

Dr. L. L. Samenhof,
dem Schöpfer des Esperanto

La Vira Kantunuigo de Reinerz komencis la solenon per forkanto. E-istoj, multaj urbanoj kaj bangastoj plenigis la vojojn ĉirkaŭ la monumento. Streĉa atento regis en la amaso dum ĉiuj paroladoj. En la nomo de Sileo s-ro Kliem salutis la ĉeestantaron, donanta mallongan historion pri la ekesto de la monumento. F-ino Hilde Boettcher el Habelschwerdt deklamis efikplene jenan prologon, verkitan de f-ino Julie Wolfson, Breslau:

„Sanktejo estas“ — diris la poet' —
„La vojo, surpaŝita de noblulo.“
Paŝadis en ĉi tiu banurbet' —
Naturon ravan antaŭ la okulo —
Tra montoĉeno, valo idilia
Noblulo Zamenhof, la Majstro nia.

Al ni nun sankta estas tiu loko!
Memorigilon jen starigis ni
Por nia kaj por estontec-epoko
Pli humaneca laŭ sopir' de li.
Partegon de la vivo li oferis
Al la progreso, kiun li esperis.

Sur dorna vojo, kruda, malebena.
Li devis iri pro homara am';
Sed fine, post agado penoplana,
Ekvidis Zamenhof komprenon jam.
Kun ĉia homa sfero en kontakto,
Fariĝis Esperanto vivofakto.

Ankoraŭ restas tamen la postulo:
Laboru kaj oferu pli kaj pli
Laŭ la ekzemplo alta de l' noblulo,
Je kies primemor' solenas ni!
Por ni disĉiploj estu vol-fortigo
Ĉi tiu hor', — admono kaj instigo!

Poste s-ro Behrendt en sia inaŭgura parolado glorigis germanlingve kaj E-e nian Majstron kiel noblaniman homon, veran edukiston de la homaro. Li transdonis la monumenton al la zorgemo de la magistrato. La urbestro transprenis ĝin, promesante, ke la urbo zorgos por la flegado al la monumento. Reprezentantoj de diversaj organizaĵoj almetis florkronojn. Speciale impresis la parolado de la blinda s-ro Selten el Breslau, kiu akcentis la meritojn de Zamenhof por la blinduloj de la tuta mondo. En la nomo de la Pollanda Esperanto-Asocio parolis Dro Broder el Katowice.

Post la inaŭguro de la monumento s-ro Kliem malkovris memortabulon fiksitan sur la vilao „Metropole“. Kun akompano de la Vira Kantunuigo Reinerz ni kantis la Himnon en ĝusta ritmo. Je la la posttagmeze granda aro kune tagmanĝis en hotelo

„Bayrischer Hof“. Partoprenis ankaŭ la urbestro, lia edzino kaj kelkaj membroj de la magistrato. Regis vera E-ista solena bonhumoro. Estis voĉlegataj multaj leteroj kaj telegramoj de diversaj organizaĵoj el la tuta mondo.

Posttagmeze multaj gesamideanoj promenadis tra la belega valo Kohlau trans Düppelhöhe, memorante pri tio, ke sur tiuj vojoj paŝadis iam Zamenhof, kiun nun honoris dece la Silezia Ligo. E-ista perstarigo de inda memorŝtono en multe vizitata banloko. Ĉiuj, kiuj travivis la festajn horojn en Bad Reinerz, certe havis la senton, ke tiu tago fakte estis „Volfortigo, admono kaj instigo“ por estonta laboro en nia Ligo.

K. Ziesche

Nationale Belange und Esperanto

Gewisse politische Kreise sehen in dem Gedanken der Einführung einer Welthilfssprache eine große Gefahr für das Deutschtum, erblicken im E ein jüdisch-marxistisches Hilfsmittel usw. usw. Aus dieser Einstellung heraus, die wohl ausschließlich gefühlsmäßig ist und auf Mangel an näherer Kenntnis des Tatsächlichen unserer Bewegung beruht, kommen von Zeit zu Zeit Zeitungsangriffe, wie z. B. unlängst durch einen mit „Esperanto-Pleite“ überschriebenen Aufsatz, in dem u. a. der Aufruf, das Deutsche E-Institut zu unterstützen, mit Genugtuung dahin gedeutet wird, daß dieses aus Mangel an Mitteln und damit auch die ganze E-Sache „Pleite machen“ wird. (Ein Grund mehr, den Aufruf auch weiterhin ernstlich zu beachten. Die Schriftleitung.) Es dürfte das Richtigste sein, nicht durch Gegenansätze in Zeitungen anderer Richtung zu antworten, sondern durch briefliche oder persönliche Fühlungnahme — wie bei dem erwähnten Aufsatz durch einen dem betreffenden Blatt nicht fernstehenden samideano bereits geschehen — über unsere Bewegung in sachlicher Form aufzuklären, insbesondere auch über die Bedeutung des E für die Wahrnehmung nationaler Belange und die in diesem Sinne bereits unternommenen Schritte und die dadurch erreichten Erfolge. Gegebenenfalls wird die Schriftleitung mit Rat und Material für ein solches Vorgehen gern zu Diensten stehen. (Wir empfehlen, die Werbeblätter „Sprachwissenschaft und Welthilfssprache“ von Dr. Th. Steche und „Lücken und Brücken von Volk zu Volk“ vom D. E. B.-Vorsitzenden auszuwerten. Die Schriftleitung.) B. V.

Biblioteko Tutmonda
estas la plej bona legaĵo por ĉiu
Esperantisto! Do aĉetu ĝin!

Wie es nicht zu sein brauchte ... und wie es sein sollte!

Wenn jemand eine Reise tut, dann kann er was erzählen! Beides tat Herr Amtsgerichtsrat W. C. laut Bericht in der „Academia“ (Monatsschrift des C. V. der katholischen deutschen Studentenverbindungen), Nr. 2, S. 29. Er besuchte nämlich die Weltausstellung in Barcelona, wohin er seine sämtlichen Sprachkenntnisse mitnahm; dessen ungeachtet mußte er doch seine besonderen Erfahrungen machen. Er schreibt:

„Dem Fußgängerverkehr dient eine besondere, durch ihre roten Uniformen leicht zu findende Polizei, — leider hat auch sie wie die Straßenbahnschaffner noch zu wenig Verständnis für Fragen in französischer oder italienischer, geschweige denn in einer anderen fremden Sprache. In dieser Beziehung tritt der Unterschied gegen Italien besonders hervor; oft drängt sich das Empfinden auf, als ob die spanische Grandezza es nicht zuließe, dem Fremden mit dem Erlernen seiner Sprache zu sehr entgegenzukommen. Befremdlich wirkt es in der Ausstellung, daß außer dem in allen möglichen Sprachen überall angeschlagenen Rauchverbot, alle Aufschriften, Wegweiser usw. nur spanisch sind.“

Also mit Englisch und Französisch war es mal wieder nichts, wie sonst jeder mehr oder weniger gebildete Deutsche meint, auch nicht im fernen, schönen Spanien! Und sogar nicht einmal mit Italienisch! Denn Italienisch und Spanisch sind eben doch „zwei Paar Stiefel“, wie die Erfahrung lehrt. Warum lernten Sie denn nicht auch noch Spanisch, Herr Amtsgerichtsrat, oder in diesem Falle noch besser Katalunisch? Und wenn Sie mal nach Prag reisen, ist es gewiß ratsam, vorher Tschechisch zu lernen!

Seine Erfahrungen wären wohl andere gewesen, wenn der Herr Amtsgerichtsrat vor seiner Reise E gelernt und sich dann den grünen Stern angesteckt hätte; gewiß hätte er dann bald Hilfe gefunden, zumal es in Barcelona zwölf (!) E-Gruppen gibt.

Was die armen Polizisten und Straßenbahnschaffner nicht alles lernen sollen! Ihr Dienst ist nicht gerade leicht und geht Tag und Nacht; nach acht- oder mehrstündiger Arbeit fällt einem an geistige Arbeit nicht gewöhnten Kopf das Studieren doppelt schwer. Und wenn sie mit vieler Mühe eine Fremdsprache lernen, können sie die andere immer noch nicht. Mögen aber unsere spanischen *samlingvanoj* — das ist unser Wunsch — möglichst bald dafür sorgen, daß die Schaffner und Polizisten wenigstens E lernen. Und wenn sie weiter dafür Sorge tragen, daß in Zukunft auch alle Aufschriften, Wegweiser usw. statt nur in Spanisch auch in E aufgemalt sind, so erleichtern sie dem Fremden das Reisen im Lande (Dienst am Kunden!), und Spanien

hat selbst den Nutzen davon. Denn was nützen alle Aufschriften, wenn man sie nicht versteht!

Jos. Engst

Für die Esperanto-Werbung

Wissen Sie . . .

daß ein großer Teil des Personals der Straßenbahn in Tallinn (Estland) E erlernt hat, da Estland in steigendem Maße von E-kundigen Reisenden besucht wird?

daß der Magistrat der Stadt Tallinn der Vereinigung der Straßenbahner 200 Kronen für E-Kurse zur Verfügung gestellt hat?

daß die Monatsschrift des Japanischen Eugenetischen Instituts „La Eugéniko“ Aufsätze in E veröffentlicht? Die übrigen in japanischer Sprache abgefaßten Aufsätze sind in einem E-Verzeichnis zusammengestellt.

daß die Ostchinesische Eisenbahn-Gesellschaft soeben die meteorologischen Beobachtungen veröffentlicht hat, die an ihren Stationen in den Jahren 1922 bis 1929 gemacht worden sind. Sie bestehen aus zwei Bänden von rund 100 Seiten, die in russischer Sprache und in E abgefaßt sind.

daß im Verlage Hirt & Sohn, Leipzig, das Bennemann-sche Handwörterbuch in Blindenschrift erscheinen wird?

daß der Rundfunksender in Odessa (Odessa Radjo Centro) demnächst auf Welle 450 einen E-Fortbildungskursus beginnt? Für die besten Leistungen sind Preise ausgesetzt.

daß die Direktion der Eisenbahn Wien—Aspang in Österreich mit Verfügung vom 19. Mai 1931 den Bediensteten das Tragen des E-Abzeichens im Dienst gestattet hat?

Goho

Benutze auch Du

die

neutrale Werbepostkarte
des D. E. B.

für Deine Korrespondenz!

Preis für 100 Stück
auf bestem Post-
kartenkarton 1,— RM.

Deutscher Esperanto-Bund
Berlin SW 61 Johanniterstraße 9
Postscheckkonto 28577

Esperanto-Movado

Raportoj por ĉi tiu fako estu sendataj ĝis la 20a ĉiumonate por la sekvanta numero (neniukaze pli malfrue!) La redakcio speciale preferas raportojn pri kursoj (ankaŭ en lernejoj!), publika paroladoj, grupfandiĝoj k. s. Malpli gravaj aferoj, ekz. festoj, ekskursoj k. s. povas esti citataj ĉi tie nur mallonge.

Mallongigoj: LG = Loka grupo de G. E. A., O = oficejo
P = prezidanto, VP = vicprezidanto, S = sekretario, K = kasisto
B = bibliotekisto, G = gvidanto de kurso, Pa = partoprenantoj.

Teritorio de G. E. A.

BERLIN. *E-Cseh-grupo.* S-ro Ĉe vizitis nian grupon 22. VI. La P salutis s-ron Ĉe, dankante al li, ke li montris la vojon, per kiu oni povas instruante gajigi la grupanojn. Post la salutvortoj s-ro Walter faris konversacion laŭ bonhumora Ĉe-metodo. Li ĝojigis la ĉeestantojn per tio, ke li pritraktis ankaŭ s-ron Ĉe kiel lernanton. — La grupo unuanime elektis s-ron Ĉe honormembro. F-ino Glaser aldonis kelkajn korajn vortojn. S-ro Ĉe dankis per longa parolado en sia bonhumora kaj kora maniero. — 6. VII. la grupo aranĝis memor-paroladon pri Prof. Carl. Krom multaj ge-E-istoj ĉeestis la E-istaj blinduloj Berlin-aj, por dokumenti la dankon al la neforgesebla patro de la E-ista blindularo. S-ro Glück parolis pri la mortinto.

— *Gr. Charlottenburg.* En somero estis nur ekskurs-vesperoj, dum kiuj oni vigle tradukis kaj konversaciis. Nun denove komenciĝos paroladoj kaj en Septembro ankaŭ kurso.

BRESLAU. Okazis en Breslau antaŭ-kongresa kunveno. 30. VII. la jam ĉeestintoj kunvenis amike sur „Liebich“-altaĵo. 31. VII. matene okazis gvidadoj, posttagmeze aŭtobusa rondveturo tra la urbo. Vespere la magistrato akceptis la E-istojn en la salonego de la urbdeputitoj. Komence kaj fine s-ino Dora Lotti Kretschmer deklamis E-poemojn. Salutis urbestro Mache por la urbo kaj promesis, ke la venonta generacio lernos E-on. S-ro Freund dankis en la nomo de la Breslau-aj E-istoj. Sekr. kons. Rosenfeld por la „Societo por nacia kulturo“ kaj por „Humboldt-unuiĝo“ parolis pri la graveco de E por la sciencistoj. Poste oni aŭskultis la reprezentantojn de dek nacioj. Dro von Grumbkow de la Breslau-a Radiostacio promesis, ke de post Septembro la programo ree enhavos E-on. La tradukojn faris f-ino M. Polier. La venontan matenon la fremduloj rigardis la mezepokan urbdomon kaj la muzeon en la iama reĝa kastelo. Ĉiuj laŭdis la bonan organizon kaj la belecon de la urbo Breslau.

DRESDEN. Loka Societo de G. E. A. Monata kunveno 19. VI. La P menciis la morton de Prof. Carl kaj memorigis speciale pri ties meritoj rilate al la 4a Kongreso en Dresden 1908, antaŭ kiu li faris dum kelkaj semajnoj rapidkursojn por la Dres-

den-aj E-istoj. La ĉeestantoj je lia honoro levigis. La P raportis pri la traktadoj kun Saksa Ligo pri la komuna aranĝo de Morario-kursoj en aŭtuno en Dresden, Freiberg kaj Chemnitz, pri la vizito de s-ro Scherer kaj prezentadoj de la Danlanda Filmo. S-ino Schwangart invitis al partopreno en la infaninterŝanĝo kun Lyon, s-ro Naumann raportis, ke Saksa Ligo sukcesis efektiviĝi interŝanĝon de 21 infanoj saksaj kaj danaj. S-ro Ranft prezentis la gramofondiskon kun la „Espero“, kies dua eldono eĉ pli bone sonas ol la unua serio, kvankam ankaŭ tiu estis tute kontentiga. Post paŭzo s-ro Naumann paroladis interese pri „Pompeji“ kun speciala pritrakto de la plej novaj elfosaĵoj; lia parolado estis tre bone ilustrata per tre klaraj lumbildoj. Partoprenintoj en la Hamburg-a kongreso, f-ino Schultz kaj ges-roj Friedmann, rakontis el la kongresaj travivaĵoj, kaj Dro Friedmann povis siajn raportojn fari plej impresaj per montri de multaj fotobildoj de li mem faritaj dum la kongreso. Riĉa aplaŭdo dankis al ĉiuj paroladintoj. — Monata kunveno 17. VII. havis viziton de s-ro Jørgensen el Danlando, kiu transdonis salutojn de la Danlanda E-istaro kaj raportis pri la estiĝo de la Danlanda Filmo, ties enhavo ktp., invitante, ke ankaŭ la germanaj E-grupoj prezentigu la filmon antaŭ granda publiko, en lernejoj kaj klerigaj unuigoj. La necesajn paŝojn, enkonduki la filmon, jam prenis sur sin Saksa Ligo. Estis preparolataj la planoj por aŭtuno (Scherer, Morario, jubileo de la Loka Societo), sed firmaj decidoj prokrastataj ĝis Aŭgusto. Poste s-ino Schwangart rakontis tre belan travivaĵon el sia Balkan-vojaĝo kaj s-ro Ranft pritraktis sub la moto „Mallibertempo“ la nunan germanan krizon de la vidpunkto de bankfakulo. Oni multe dankis al li por la interesaj sciigoj, kiuj akcentis la neceson de fido kiel la unuan kondiĉon por bona fino de la krizo. Oni adiaŭtis por du monatoj, en Aŭgusto pro libertempoj verŝajne ne okazos monata kunveno.

DUISBURG. LG. Finigis la kurso de s-ro Pape; aliĝis al la grupo ses Pa kaj du policanoj. Propono pri fiksiĝo de kesto aŭ afiŝo en la stacidoma halo jam de longa tempo estas submetata al la estraro de la stacidomo. — Oni decidis kunveni de mardo marde anstataŭ lunde.

MAGDEBURG. LG. Je amika kunveno unuiĝis dimandon, 28. VI., en Magdeburg ĉirkaŭ 45 gesamideanoj el Berlin, Helmstedt, Potsdam, Quedlinburg kaj Magdeburg. Post mallonga promenado tra la urbo la ĝardenrestoracio apud la Adolf-Mittag-See instigis je ripozo, kaj la bela vetero zorgis por bonhumoro. S-ro Natho, P de la grupo, gaje bonvenigis la gastojn. Post promenado ĉirkaŭ la lago kaj rigardado al la urbo kaj ĝia proksimejo de sur la foirturo alvenis baldaŭ la tempo, kiam tramo kaj aŭtobuso kondukis la partoprenantojn al la Stadiono

por la komuna tagmanĝo. Eksonis la himno, majstre ludita de s-ro Markau el Potsdam. Kelkaj samideanoj kun plezuro sin ĵetis en la akvon, dum la aliaj kuŝis en la ombro de la arbetaĵo. La posttagmezo nin vidis en Herrenkrug, kie sub la sonoj de la orkestro rapide pasis la lastaj horoj de la kunesto. Oni promenis en la bela parko ĝis la bordo de la Elbe, babilis kaj fotografis. Baldaŭ post la adiaŭa parolado de Eino Glaser el Berlin, esprimanta la dankon de la gegastoj, finiĝis la festo kaj oni reveturis al la stacidomo.

NORDERNEY. La Vicdelegito de U. E. A., Otto Wiemers, posedanto de du pensionejoj, fiksas je la muro de la mar-vilao „Miramar“ apud la germana mangokarto ankaŭ internacian mangokarton (kompilita de Ernst Wichert, Berlin). Super la internacia mangokarto oni legas en grandaj preslitteroj la vorton „Esperanto“. Multe da pasantaj bangastoj haltas antaŭ la elpendaĵo, legas pri E kaj pripensas. Do, bona propagandilo!

STUTTGART. LG. Kunvenejo „Hotel Ihle“, Schellingstr. 5 (malantaŭ „Hotel Dierlamm“). Kunvenoj jaŭde je la 20a h. — En Julio ni havis viziton de angla samideanino.

Ausland

CHINA. Seit Januar d. J. erscheint als offizielles Organ des E-Instituts in Canton die Zeitschrift „Kantona E-isto“ (Anschriŝt: P. O. Box 88, Canton, China). — Die Bewegung schreitet, obschon sie bereits seit mehr als 25 Jahren im Lande Fuß gefaßt hat, nur langsam aber zielbewußt vorwärts. Trotzdem E als Sprache nach Form und Aufbau der Landessprache vollkommen unähnlich ist, lernen die Chinesen E leichter als ihre Muttersprache. Würden nicht die inneren Zustände des Landes die Bewegung hemmen, wäre die E-Bewegung in China ebenso lebhaft als in Europa. Nachdem China Republik geworden, schreitet die Bewegung schneller vorwärts. Nachfolgend einige Zahlen aus der Bewegung: 1906 wurde der erste E-Kursus in Schanghai abgehalten; 1908 erschien die erste E-Zeitung „La Nova Epoko“ (die in Paris gedruckt wurde); 1909 Gründung des Chinesischen E-Bundes; 1912 wird E in den Landeschulen eingeführt, Umbildung des Chinesischen E-Bundes; 1913 erscheinen „Aina Socialistoj“ und „La Voĉo de la Popolo“; 1919 wird der E-Bund Schanghai gegründet; 1920 erscheint die Halbmonatsschrift „La Verda Standardo“. 1922 wohnten 2000 Personen der Feier des Geburtstages Samenpofs bei, 1926 waren es 5000 Teilnehmer. Im gleichen Jahre wurde das E-Institut in Canton gegründet. In den folgenden Jahren entstehen Gruppen in vielen Orten, deren Zweck ist, E in den Schulen und Büros zu verbreiten.

FRANKREICH. In Paris hat sich ein Verband vielsprachiger Chauffeure gebildet, der sich im Auslandsverkehr nur des E bedient. — Zeitungen, wie „Le Soir“, „La Volonté“, „La Semaine Religieuse“, „La Phare Medical de Paris“, „Les Cahiers des Droits de l'Homme“ brachten E-Aufsätze. — In Le Havre mehrere Kurse u. a. an der oberen Handelsschule und bei der Sendestation Radio-Normandie.

ITALIEN. Der Ausschuß für die Jahrhundertfeier zu Ehren des heiligen Antonius hat ein 32 Seiten starken Führer für Pilger herausgegeben. *Goho.*

Esperanto-Kongresoj

21a Germana Esperanto-Kongreso Chemnitz, Pentekoston 1932

Ila Bulteno

Jam aliĝis — laŭ la cirkonstancoj — gajige granda nombro da partoprenantoj; konsidere al la malfacila situacio, en kiu en la nuna peza tempo troviĝas la L. K. K., ĝi dankas al la komprenemaj gesamideanoj, kiuj tiamaniere subtenas la arangadon de la kongreso, kaj insiste petas ĉiujn kongresantojn, plejeble baldaŭ ankaŭ aliĝi.

La aliĝiloj estos aldonataj al la oktobra numero de G. E.

Donac(eg-etoj) jam nun estas danke akceptataj. Postĉeka konto Leipzig 916 68 aŭ Giro-Konto 2244 Chemnitzer Girobank (ambaŭ kontoj: „21. Deutscher Esperanto-Kongreß Chemnitz 1932“).

La provizora programo estas jena:

Sabaton, 14. V.: Kunsido de la Estraro kaj Konsilantaro de G. E. A. — Interkonatiga vespero.

Dimanĉon, 15. V.: Solena malfermo de la kongreso — Komuna fotografado — Komuna bankedo (vidu la aliĝilon) — Unua laborkunsido — Vespere senceremonia kunestado en la fame konata flughaveno.

Lundon, 16. V.: Dua laborkunsido kun parolado en E pri temo ankoraŭ fiksota kaj diskutado pri ĝi — Tagmanĝo — Ferma kunsido — Senceremonia kunestado en urbdoma vinkelo aŭ restoracio aŭ kafejo.

Ekster la oficiala programo:

Mardon, 17. V.: Rondveturado tra la urbo — Aliĝe aŭtobusado trans la kastelon Augustusburg al Fichtelberg, plej alta monto de Saksujo, poste tra la urbo Annaberg (fame konata interalie per la aritmetikisto Adam Riese) al la monto Pöhlberg, tie arangado de „Hutzenabend“ kun dialektaj deklamoj ktp. — aŭ vizito al la akvobarilo Kriebstein, laŭpejzaĝe la plej bela akvobarilo en Germanujo.

Merkredon, 18. V.: Por la partoprenintoj en la ekskurso al Fichtelberg: vizito al la akvobariĵo Kriebstein.

Por ebligi plejeble baldaŭ definitivan programon, la L. K. K. petas ĉiujn organizaĵojn, kiuj intencas aranĝi okaze de la 21a specialajn kunsidojn, sciigi tion al ĝi plejeble baldaŭ.

Do, via devizo: Al Chemnitz!

Loka Kongresa Komitato Chemnitz 1932
Adreso: 21. Deutscher Esperanto-Kongreß
Chemnitz 1932

Chemnitz, Altenhainer Str. 34 II

Ne forgesu almeti poŝtmarkojn por dezirataj respondoj.

Internaciaj E-Tagoj en Berlin

La Berlin-a kvazaŭa antaŭkongreso bone sukcesis. Partoprenis gesamideanoj el sep diversaj landoj. 28. VII. en Kafejo Central senĝena interkonataĵa vespero. — 29. VII. antaŭtagmeze rondveturado per speciala aŭtobuso tra Berlin, komuna tagmanĝo en Haus Vaterland; posttagmeze per Elite-aŭtobuso veturado al kaj tra Potsdam, rava Elite-motorboat-veturado sur la ĉarma Havel. Vespere salutvespero en per floroj kaj E-flagoj riĉe ornamita ĉambrego de „Alter Askanier“. Prezidis s-ro E. Lindemann, kiu salutis la multnombrian ĉeestantaron en la nomo de la aranĝinto, E-Gruparo Berlin. Li klarigis, kial la Gruparo ne aranĝis oficialan antaŭkongreson kaj dankis al la eksterlandaj geamikoj pro ilia vizito. Samideano Behrendt, Prezidanto de G. E. A., salutis en la nomo de G. E. A. Sekvis salutvortoj amikaj kaj dankaj de reprezentantoj de la diversaj nacioj. Tro rapide pasis la vespero. — 30. VII. antaŭtagmeze vizito al Internacia Konstruaĵ-Ekspozicio kaj laŭvolaj gvidadoj tra la urbo. Posttagmeze vizito al flughaveno Tempelhof. Feliĉa, al la E-istoj favora hazardo donis spektaklon neatenditan: En tiu posttagmezo alvenis en Berlin la aerŝipo „Graf Zeppelin“ el la arkta regiono. Majeste kaj grandioze alproksimiĝis la „argenta“ miraklo de la tekniko. La gesamideanoj havis okazon, observi el plej-proksimeco la surterigon kaj forflugon de la aer-giganto. Ili vidis kaj aŭdis Dron Eckener kaj la Berlin-an ĉefurbestron Dron Sahn. Neniam ili forgesos ĉi tiun posttagmezon. Vespere komuna vizito al Luna-Park, kie oni bonege amuziĝis ĝia frua matenhoru. Dankon al ĉiuj, kiuj vizitis nin kaj dankon al niaj fervoraj junaj helpantoj, kiuj ĉiam estis je la dispoŝo de niaj gastoj.

E-Gruparo Berlin

Diversaj Komunikoj

Grava decido de la Brita Unuiĝo por la Ligo de Nacioj rilate al Internacia Helplingvo

Kelkatempe post la Kongreso en Oxford (Aŭgusto 1930) mi interrilatis kun la Unuiĝo por la Ligo de Nacioj (League of Nations Union, 15, Grosvenor Crescent, London S. W. 1, kleriga kaj propaganda asocio por la Ligo de Nacioj en Anglujo) pri la eblecoj de oficiala subteno al E, kaj ĝia utiligo en la servo de tiu asocio por faciligi interpopolan interkompreniĝadon en ĝia tiucela fako. Post ioma intertraktado la asocio decidis meti la demandon antaŭsian edukan Komitaton, al kiu la Brita E-Asocio provizis plenajn detalojn pri E kaj ĝiaj pretendoj, kiujn ĝi zorge studis.

En Marto 1931 ĝi anoncis, ke Mondedukada Konferenco sub la aŭspicioj de la Edukada Informcentro de la Sekretariaro en Geneve verŝajne okazos en 1932 aŭ 1933. Konsiderante ĉi tion, ĝi rezolucis jene:

(Traduko) „Ke, kiam tia Mondkonferenco estos kunvokita sub la aŭspicioj de la Ligo de Nacioj, ĝi estu petata de la Unuiĝo konsideri, interalie, kaj raportu pri (1) la bezono por internacia helplingvo kiel rimedo por antaŭenigi internacian interkompreniĝadon, (2) la plej taŭga lingvo por adopti, se tia surogata rimedo de komunikado estos trovita dezirinda, kaj (3) la metodoj, per kiuj ĝi povus plejbone esti instruata.“

Nun kompreneble estas necese, ke la decido de la Unuiĝo trovi eĥon kaj vektian intereson, kia donas apogon al la rezolucio, kiam ĝi estos prezentata al la Konferenco, kaj ankaŭ samtempe forton al nia flanko. Tial mi skribas, esperante, ke vi povos helpi en iuj el la subaj manieroj:

1) Disvastigi per ĉiuj rimedoj la novaĵon. Mi dankus, se vi bonvolus sendi al mi iujn preseltranĉaĵojn, ĉu E-ajn, ĉu nacilingvajn.

2) Klopodi por vekti intereson pri la decido de similaj asocioj; se eble sondi la sintenon de tiuj asocioj pri la demando, kaj precipe pri E, celante en favoraj okazoj esti ĝi similajn priesplorojn.

3) Simile prizorgi diskonigon kaj varbon de subteno en pedagogiaj rondoj.

Rilate al paragrafoj 2) kaj 3), mi ankaŭ satus ricevi informon, komentojn aŭ sugestojn, fakte iujn sciigojn, kiuj ebligas ordigi laŭeble plenajn detalojn por pluaj intertraktadoj kun la Unuiĝo kaj informo al ĝi.

Se estas iu detalo, pri kiu plia informo aŭ klarigo estas dezirata, mi volontege provizos laŭeble, aŭ sendos kopion de ĉi tiu cirkulero al kunlaboremaj personoj en la koncernaj fakoj post peto.

E. D. Durrant, „Eversleigh“ Ipswich Road, Woodbridge, Suffolk (Anglujo)

Aus der Wortbildungslehre:

Kotizo estas pagenda!

Internacia Pedagogia Instituto en Mainz

Tute en silento naskiĝis la Internacia Pedagogia Instituto en Mainz (Germanujo). Ĝi estas infano de serioza laboro kaj senlima sindonemo. Kaj la infano bone kreskas kaj nun jam invitas la popolojn, ĝin viziti. La instituto loĝas en iama granda kazerno — Citadelo. En 40 ĉambregoj troviĝas ekspozicio de lernejoj el diversaj landoj. Jam ekzistas filmteatro por montri instru-filmojn de ĉiuj landoj, kiuj emas konatigi siajn filmojn, taŭgajn por lernejo. Enlandaj kaj eksterlandaj firmoj montras en granda ekspozicio siajn lernilojn por la diversaj instru-fakoj, de la plej simplaj iloj por la fundamenta instruado ĝis la plej komplikaj optikaj kaj meĥanikaj aparatoj. Jam estas preta la hejmo de nacioj kun 50 ĉambroj por gastigi la vizitantojn. En Oktobro 1931 estos 100 ĉambroj pretaj por vi, geinstruistoj de la tuta mondo. Sed ankaŭ studentoj trovos hejmon. Estas jam pretaj kvar hejmoj por studentoj. Ili trovos ĉion, kion ili bezonas, en bona pura stato. La regularo en la domo zorgas, ke ĉio estu ĉiam en bona ordo. La student-hejmo ne estas en iu interligo kun aliaj hejmoj aŭ tendaro. Ĝi estas tute memstara. Ne trovos eniron iu alia grupo. Nepra kondiĉo estas: La gvidanto devas esti respondeca instruisto aŭ instruistino.

En tiu instituto la tutmonda geinstruistaro interkonatiĝos, ĉar la gekolegoj loĝos ne en la urbo, sed kune en la sama domo. Ili manĝos en komuna manĝoĉambrego, ili estas ĉiam en bona kontakto, kaj fadenoj fariĝos de unu popolo al alia. La samon oni povas diri pri la studentoj.

Karaj gekolegoj tutmondaj! Estas via devo, nun E-igi tiun unikan entreprenon. Ĝi estas por vi, ĝi estos la via, se vige kaj celkonscie vi partoprenos la vojaĝojn al Mainz. Kiam en viaj fakgazetoj aŭ fakbunvenoj temas pri tiu instituto, tuj vin anoncu por la vojaĝo aŭ por la gvidado de junulara grupo. La diverslandaj ministerioj donas stipendiojn. Kelkaj ŝtatoj jam havas sian pretan hejmon en la instituto. La direktoro, instru-konsilisto *Niemann*, estas homo de ago, ne de vorto. Li komencis sian laboron per vojaĝoj al la ministerioj de Eŭropo, kaj li ricevis subtenon. Nun li anoncis la pretan hejmon, kaj jam venas instruistoj el Aŭstrujo, Bulgarujo, Danlando, Sudslavujo, Rumanujo. Ankaŭ al vi, gesamideanoj de ĉiuspecaj lernejoj, li prezentas hejmon por kelkaj tagoj. Venu kiel E-isto, anoncu vian alvenon al la E-Grupo de Mainz, ne kaŝu vian verdan stelon! Certe impresos la ne-E-istajn gekolegojn, se, alveninte, vi jam trovos gekolegojn en la stacidomo, kiuj konvenigas vin. Vi ĉiam estos bonvena en nia grupkunveno, en kiu estas kelkaj gekolegoj.

Adreso de la grupestro: *A. Läufer*, Mainz (Germanujo), Willigisplatz 2.

Kiu estas Esperantisto?

Laŭ la Deklaracio pri Esperantismo, akceptita de la Unua Kongreso de Esperanto, Boulogne 1905, *Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas.*

Scias kaj uzas! Scias kaj uzas!

Konscienc-demandon ni ne faros. Sed vi certe konsentos pri tio, ke multaj tielnomataj E-istoj estas nur duone aŭ kvarone E-istoj, aŭ, pli ĝuste, ne estas E-istoj, ĉar...

E estas lingvo. Kaj lingvon oni ne lernas ludante. Ankaŭ ne E-on. Necesa estas serioza studado. Bedaŭrinde, survoje al la celo, multaj faletas, falas, ne restarigas sin, perdiĝas. Senpacience ili rezignas la studon. Ho, malfortuloj!

Ne perdu la kuraĝon ĉe la unua malfacilaĵo. Pripensu, ke la scion de E ne alportas al vi la vento. Fariĝu *Esperantisto!*

(El *Dordrehta Esperantisto*)

Germana Instruista Gazeto eldonis specialan Esperanto-numeron

Okaze de la Germana E-Kongreso dum pasinta Pentekosto la Hamburg-a Instruista Gazeto (*Hamburger Lehrerzeitung*) en n-ro 21/22 publikigis sur naŭ paĝoj artikolojn pri E: Internacia Instruistaro kaj E, E en la lernejo, E kiel literatura lingvo, International Auxiliary Language Association (I.A.L.A., Internacia Helplingva Asocio), Jarraporto de la E-Asocio de Saksaj Instruistoj. La unuaj kvar artikoloj estas aĉeteblaj (okpaĝa flugfolio germanlingva) ĉe s-ro Schneller, Rückmarsdorfer Str. 1, Leipzig W 35, por 0,20 RM (10 ekz. 1,50 RM, 50 ekz. 6,— RM). Havigu al vi la ampleksan propagand-materialon speciale verkitan por instruistoj.

Ŝparu jam nun

por la venontjara

Kongres-vojaĝo

al la 24a en Paris!

M i a r a n ĝ o s

Kongres-karavanon

komenciĝontan en

Berlin, Köln kaj
Frankfurt (Main).

S. Ellersiek

Bibliografio

La libroj ktp. signifitaj per steleto estas haveblaj ĉe Friedrich Ellersiek, G.m.b.H., Esperanto-Verlag, Berlin SW 61 la ceteraj estas havigataj nur laŭ speciala deziro. La montritaj prezoj ne estas devigaj. — RM = Marko germana. Ni recenzas nur verkojn, de kiuj ni ricevis du ekzemplerojn. Unuope senditaj nov-elvenintaĵoj estas nur bibliografie citataj.

Libroj kaj broŝuroj

*LONDON, Jack: *La Fera Kalkanumo. El la Angla trad. Georgo Saville. Leipzig 1930: Eldona Fako Kooperativa de S. A. T. Prezo: 2,60 RM.* [910]

Supozu, ke pasis ĉirkaŭe sep jarcentoj post ni; sekve oni vivas en epoko, kiu jam havas sufiĉan historian distancon rilate al la okazintaĵoj de l' hodiaŭa epoko. Estas la jaro „419 B. O. M.“, t. e. Brotherhood of Man-Frateco de l' Homo. En ĉi tiuj tagoj de nova tempokalkulo oni trovas manuskripton, kiu traktas la tumultan periodon 1912—1932 laŭ krista tempokalkulo. Kio okazis dum tiu periodo en Usono, kiel interbatalis laboristoj, burĝoj, kamparanoj, kiel aperis la „Oligarkio“, la Fera Kalkanumo, kaj premeĝis la homaron, ĉi tion rakontas al ni la socialisto, la verkisto, la filozofo, la poeto Jack London. Pri li la tradukinto diras: „Jack London estis genia studanto, sed li estis eĉ pli genia verkisto, laŭ kvanto . . . Vere, verkisto-artisto povas mirige priskribi individuojn kaj situaciojn, ne komprenante, ĝis fundo, la sciencojn, kiun tiuj uloj kaj situacioj vivigas — lia genio subkonscie gvidas lin —; . . . sed trafe klarigi, en populara lingvo, la sciencajn teoriojn de Marks kaj Engels povas nur homo, kiu komprenas kaj subtenas ilin.“

La legado de ĉi tiu libro kaptas senton kaj mension, animon kaj cerbon, kaj ĝi samtempe — terurigas! Sed ĉi tiu libro havas plian valoron: ĝi avertas! Kaj pro tio la legado, eĉ studado, estas rekomendinda: „Kiom longe laboristoj kaj kapitalistoj ekzistos, tiom longe ili daŭros malpaci pri la divido.“ — „Jes, etiko de porkoj! Tia estis la signifo de la kapitalista sistemo.“ — „La Eklezio pardonas la teruran brutecon kaj sovaĝecon, per kiu la kapitalista klaso traktas la laboristan klason.“

La E-traduko de la angla originalo estas bonega, kvankam ne plaĉas al mi kelkaj parolturnoj kaj vortformoj, kiuj ŝajnas fariĝi specialaĵoj de S. A. T.-libroj; aliflanke mi konfesas, ke jen kaj jen agrable surprizas lerta vortkunmetado. Entute: serioze, tre serioze konsiderinda libro, bonvenigenda riĉigo al nia trezoro de tradukliteraturo.

Behrendt

KRYSTA, Ludw.: *Pri la prononcado de Esperanto. Katowice 1931: Mondlingva Eldonejo. Prezo: 0,35 RM.* [987]

Ekzistas du malsamaj opinioj pri la prononcado de nia lingvo: unuj propagandas la tielnomatan Zamenhof-an (polan?) elparoladon, laŭ kiu la vokaloj estu ĉiam samaj kaj mezlongaj(?); la aliaj konstatis, ke la plimulto de la E-istoj ĝenerale parolas fermitajn vokalojn en nefermitaj silaboj kaj nefermitajn vokalojn en fermitaj. Kiu volas legi pri tio pli multajn detalojn, tiu legu la unuan parton de mia „E-Deutsches Handwörterbuch“ aŭ la tre bonan artikolon pri tiu ĉi demando verkitan de Kalocsay en la unua numero de la nuna „Literatura Mondo“. Kalocsay eldiras tie la tre inteligentan konstataĵon, ke E ne havas slavan *strukturen*, kaj tial ankaŭ ne povas havi slavan *prononcon!* — Krysta, male, volas propagandi la Zamenhof-an, tute subjektive Zamenhof-an, parolmanieron. Nu jes, bone: Zamenhof havis tiun opinionon kaj intencon; sed la praktiko iris laŭ alia vojo. Kaj la kialon al ni ja malkaŝis Kalocsay. — Krysta certe ne estas sufiĉe kompetenta, por povi prijuĝi la aferon. Lia scio pri E ja estas ankoraŭ tiel malgranda, ke li eĉ ne kapablas uzi la pronomon „sia“; li skribas: Germanoj direktu ilian atenton speciale al . . . ; ili pro ilia lingva mallerteco tre emas al . . . ; la ĉinoj ne posedas tiun literon en ilia nacia lingvo . . . ktp. — Li rakontas, kion judo al li rakontis pri la juda „jargono judiŝ aŭ jidiŝ“, kaj konstatas, ke tiu judo estas prava (li diras: pravas!), ĉar „ekzistas nun jam tri judaj dialektoj: la ŝfardia, aŝkinaza kaj hasida“. Li juĝas pri tiu afero kaj scias pri ĝi tro malmulte por scii, ke jidiŝ (tute ne judiŝ!) ne estas jargono, sed lingvo, kaj ke la menciitaj de li tri dialektoj ne estas dialektoj de la lingvo jidiŝ, sed prononcoj de la hebrea lingvo, kio estas io tute alia! — Kaj kiel malmulte Krysta komprenas la aferon, pri kiu li kurtaĝas eldoni libron, tion pruvas alineo sur pĝ. 29. Tie li diras, ke la E-istoj ĝenerale malkorekte elparolas la vortojn „ekde“, „depost“ ktp., akcentante ties lastan silabon. Kaj Krysta tute ne rimarkis, ke ĉi tie la eraro kaj malkorektaĵo tute ne troviĝas en la prononcado; sed „ekde“ tute ne estas E-vorto, sed sensencaĵo, kaj „depost“ — ĝuste pro tio, ke laŭ la senco la akcentado de „post“ estas tute korekta! — devas esti skribata „de post“! — Pardonu min, leginto, ke mi foruzis tiom da bona papero kaj tiom de via kara tempo por tiu ĉi malbona verketo, kiun mi devas nepre kaj energie malrekomendi! *Karl Minor, L. K.*

*SALOM-ALEJHEM: *Ce Doktoro. Monologo. El la Hebrea trad. Josef Rabinovic-Tajc. Jerusalem, Erec-Izrael 1931: Propreldono de l' aŭtoro. Prezo: 0,25 RM.* [953]

La tuta monologo estas nur okpaĝa, kaj relative same mallonga estu mia recenzo. La traduko estas farita en korekta E; tamen mankas en ĝi la karakteriza stilo de la originalo, kiun kapablis konservi Zamenhof

en sia traduko de „La Gimnazio“ de la sama aŭtoro. Sed kial fari specialan eldonon de tia bagatelaĵo? Tiajn felietonaĵojn presu E-a gazeto, aŭ oni kolektu materialon sufiĉantan por libro kaj nur tiam ĝin publikigu.

Karl Minor, L. K.

*DREZEN, E.: *Analiza Historio de Esperanto-Movado. Leipzig 1931: Eldono de „EKRELO“.* Prezo: 1,70 RM. [1952]

„La lingvo-projekto Esperanto povis sukcesi kaj sukcesis kiel lingvo internacia nur dank' al speciale favora situacio, dank' al tio, ke ĉe certaj sociaj rondoj jam estis bone preparita la idea tereno por akcepto de la lingvo internacia“ — jen la unua propozicio de la broŝuro, kiu klare montras la, mi diru, subjektivan vidpunkton, de kiu Drezen pritraktas sian temon. Laŭ li E sukcesis „nur dank' al speciale favora situacio“. Kaj same kiel li knedas la materialon laŭ sia volo, li ankaŭ traktas la lingvon de Zamenhof. Jam kelkfoje mi konstatis — legante verkojn de komunistoj-E-istoj kaj tielnomataj „burgaj“ samideanoj —, ke ni havas kvazaŭ du lingvojn, kiuj inter si similas kaj diferencas kiel la germanaj lingvoj parolataj en Germanujo kaj Aŭstrujo. La komunistoj-E-istoj uzas ne nur -io anstataŭ -ujo, ili ankaŭ klopodegas konstrui formojn kun kiom eble plej malmultaj afiksoj, kaj ili, antaŭ ĉio, kvazaŭ serĉas okazojn, por diri „-as“ anstataŭ „estas -a“, kvankam „-i“ ja ne havas la signifon de „esti“, kiel Zamenhof klare diris. Drezen diras: „Tiu aserto absolute ĝustas“ (anstataŭ „estas ĝusta“) ktp. — Kiel estas granda diferenco inter ĉiuj naciaj lingvoj kaj E (vidu la paroladon de Dro Theodor Steche okaze de la 20a Germana E-Kongreso, Hamburgo 1931), tiel ankaŭ estas diferenco inter nia literaturo kaj la literaturoj de la naciaj lingvoj: nia literaturo estas, preskaŭ senescepte, materialo por ekzercigado de nia lingvo — kvankam ni havas multajn verkojn, kiuj povus bone servi ankaŭ al aliaj celoj. Kaj pro tiu ĉefa celo de la E-aj libroj ni devas, laŭ mia opinio, malakcepti kaj repuŝi ĉiujn librojn, kiuj — laŭ niaj samideanoj legas ilin kiel ekzercon — forigas ilin de la lingvo, kiun donis al ni Zamenhof... eĉ se la enhavo de tiuj libroj estus laŭdinda. Mi ne volas nei, ke la libro de Drezen donus al la legantoj tute gravajn sciojn pri la historio de nia lingvo, pri Einstein, Trompeter, Grabowski, Beaufront, Bourlet kaj aliaj; sed samtempe ĝi donus al ili „Rusan Esperanton“, sed ne la „Internaciam Lingvon“, kiun ni deziras.

Karl Minor, L. K.

*WELZL, Jan: *Tridek Jarojn en la Ora Nordo. (Kun portreto de l' aŭtoro.) Olo-mouc 1931: Moraviaj Esperanto-Pioniroj.* Prezo: broŝ. 4,50 RM, bind. 5,30 RM. [1981]

La unua impresio, kiun faras la broŝurila ekzemplero de tiu ĉi novaĵo: antaŭ kiam

vi legis la unuan duonon de la libro, vi perdis la duan duonon! La folioj simple distalas. Sed se oni legis la komencon, oni jam atentis pri la folioj, por povi ellegi la tutan libron. „Tridek jarojn en la ora nordo“ ne estas romano. Por tio mankas al la enhavo la interplektigo de homaj sortoj kaj la artisma formo. Ĝi ankaŭ ne estas vojaĝa raporto kutimspeca. Por tio mankas la sekeco. Vojaĝaj raportoj ĝenerale pentras kaj priskribas kiom eble plej objekte kaj klopodas, elmontri la rilatojn de la naturo kaj cirkonstancoj al la vojaĝinto. La „Ora Nordo“ rakontas pri la naturo, la vivo, la moroj kaj la kutimoj en tute subjektiva maniero. La tuta libro similas al Jan Welzl, kies foto estas al ĝi aldonita. La raporto pri tiu tridekjara vivado inter eskimoj ne estas artaĵo, sed diletantata kompilo de travivaĵoj, pri kies vereco oni kelkfoje dubas, malgraŭ energia mala aserto. Kelkaj el la legontoj eble legis „Krieg“ de Renn. Pri tiu libro min ofte memorigis la „Ora Nordo“ pro la simpla kaj senarteca de verkado. — Kritikindaĵo estas la mi-formo, kiu min ĝenis, ĉar klare estas dirite, ke ĉion travivis Welzl kaj ĉion notis redaktoro. Do ofte, kiam oni renkontas banalan aŭ saĝan eldiron, oni ne scias, kiu estas tiu „mi“, ĉu Welzl, ĉu la redaktoro? Sed eble tio ne ĝenos la plimulton de la granda legantaro, kiun mi deziras al tiu bela libro.

Karl Minor, L. K.

*JAUMOTTE, Maur.: *Kompleta Esperanta Rinvortaro. Dua eldono, reviziita kaj kompletigita. Antwerpen 1930: Belga Esperanto-Instituto.* Prezo: 1,40 RM. [1964]

Ĝoju, poetoj, Maur. Jaumotte kompilis por vi novan rinvortaron! Ĝis nun ni havis nur du malgrandajn rinvortaretojn elvenintajn en Paris kaj London antaŭ ĉirkaŭ 25 resp. 10 jaroj. Jaumotte konstatis — cetero tute prave — ke la E-a rimita poezio ne havas altan nivelon, kaj li, supozeble, kulpigis pri tio la nekompletecon de nia ĝisnuna rinvortaro. Krom tio, Belga E-Instituto, la eldoninto de la verko, kredis necesa duan eldonon de la verko; do niaj poetoj ĝoju kaj surprizu nin per pli bonaj poeziaĵoj ol ĝis nun. — En tia rinvortaro, kiu ja estas nur kolekto da radikoj ordigita — aŭ ordigenda — laŭ la lasta vokalo (de la radiko), oni povas fakte fari nur unu principan malkorektaĵon: meti vortojn ĉe alia ol la akcentata vokalo. Kaj tiun malkorektaĵon efektive faras Jaumotte ĉe la partikloj kaj tielnomataj tabelvortoj. Li vidis, kompreneble, la malfacilaĵon, sed ne solvis ĝin. Li parolas pri „kelkaj vortoj, kiuj ne bezonas gramatikan finaĵon“ kaj inter ili mencias „hodiaŭ“ kaj „morgaŭ“. La esenco estas, ke oni atentu speciale la vortojn, kiuj ne povas havi finaĵon. Ili restu for el tia rinvortaro. Sed „ĉio“ staru — kun o inter krampoj: ĉi(o) — inter

„kaŭci“ kaj „pioĉi*“); „kio“, „tio“, „nenio“ rimas al vortoj kun akcentata -i- kaj tial apartenas al tiu litero kaj ne al -o. Ĉi tie oetere mi trovas dufoje la vorton „tio“, krome vorton „alo“, kiu laŭ sia arango ne bezonas finaĵon, kaj kiun mi ne konas. Same estas pri vorto „ŝki“. Kiu konas radikon „sejh“? Ĉu kunmetitaj vortoj — vicreĝ, pufseĝ — havu lokon ĉi tie? Kaj kial nur tiuj du sub „eĝ“ kaj ne ankaŭ „brakseĝ“ kaj „militleĝ“ kaj dek aliaj?

Karl Minor, L. K.

*BAGHY, Julio: *Printempo en la Aŭtuno. Rakonto pri dolĉe melankolia renkonto. Kun ilustraĵoj de Irma Szathmáry. Köln 1931: Heroldo de Esperanto. Prezo: 2,— RM.* [971

„Du trovitaj infanoj renkontas sin, demandas kaj respondas.“ Li estas gimnaziano; ŝi — 16-jara knabino, kiam arlekeno kaj komedianto edukas en kermesa tendo. La gejunuloj interkonatiĝas la 10an de Oktobro: printempo en la aŭtuno. Delikatega neni-aĵo, kiun ĉarmege rakontas Julio Baghy. Kun intereso oni legas tiun romantikan epizodon. Nur kiam Baltazar, la komedianto, filozofias pri la Ŝajno, oni diras kiel Fridolin, la arlekeno: „Strangajn, kuriozajn pensojn vi havas; mi dezirus kompreni vin, sed mi ne povas. Mi aŭdas la vortojn, komprenas ilin, sed entute ilian sencan mi ne povas percepti.“ Kaj eĉ la respondo ŝajnas esti konsentinda: „Ne grave. Eĉ pli bone, se vi ne komprenas.“ Baghy ŝajnas kredi, ke, por plivalorigi rakonton, oni devas spici ĝin per iom da filozofio. Se li estus forstrekinta tiun dialogon pri la Ŝajno kaj, ĉe la fino, la vanan serĉadon ĉe la kruco, kiu estas ne poezio, sed nur rutina sensaciemo, la rakonto estus pli bona, malgraŭ certa kvanto da stilaj kaj gramatikaj „individuaĵoj“, kiuj ankaŭ ĉi tie ne mankas.

Karl Minor, L. K.

*BAGHY, Julio: *Dancu, Marionetoj! Novelaro. Dua eldono. Budapest 1931: Eldono de la aŭtoro. Prezo: broŝ. 3,— RM, tole bind. 4,80 RM.* [990

Dancu, Marionetoj! — Tiu ĉi titolo estas karakteriza por la novelaro: la homfiguroj, kiujn pentras Baghy, ne vivas kiel homoj, sed dancas kiel marionetoj. Tiel (kiel en „Nur Homo“) ne kondutas nek filozofias bienmastrino kaj militkaptita soldato. En „La Metropolo malsatas“ estas parolo pri publikulino kaj ŝia „fianĉo“, kiuj havas la konduton de konsistoria konsilisto kaj lia edzino. Marionetoj! — Sur paĝo 113 Baghy diras: „Mia fantazio koketas“. Trafa diro! Konforma al tio estas multaj esprimoj en la libro: „La prasilento retiris sin por ripozi“, „La vortoj banas sin en sentoj“, „La luno estas ŝveliginta kiel graveda kuniklo“ ktp. Tiel fantaziaj estas multaj frazoj. „Uragano“ estas eĉ tiom fantazia, ke mia

* Radikon „pioĉi“ mi ne konas, nek la postan „farĉi“ (sur paĝo 38).

materia cerbo tute ne povas sekvi kaj vane demandas, kion la tuta rakonto signifas. — Kiam Baghy fantazias pri si mem, li arigas malĝojajn pensojn de melankoliulo. Sed kvankam tiel li sin mem karakterizas, la ŝercemaj produktoj de lia plumo estas multe pli konvinkaj. Vidu „Kiel Mihok instruas angle“. — Vere belaj kaj legindaj el la dek aŭ dek unu rakontoj estas „Tri kamaradoj“ kaj „Koro de parenco“. Sed oni devas nepre postuli, ke Baghy evitu ne-E-ajn naciismojn kaj sendubajn malkorektaĵojn, el kiuj mi citas nur kelkajn: la virino senvestas (senvestigas) sin; li hontas sin; sed tio estas neeble (neebla); tia parolo estas malpermesite, kaj kio estas malpermesite, tio estas leĝo; la virinon surprizas ŝia kuraĝo; kiel opinius pri li siaj kolegoj; la maneto similas al tiu de ŝia edzino; ju pli ŝi sentas tion, des pli tremadas; en tiu kiso ŝi sentus ĉion, kion esprimi neeble per vortoj; ŝi diris al li, ke faru pacon; ktp. ktp. — Kaj sur la dorso de tiu ĉi libro de Julio Baghy oni povas legi en rekomendo pri „Literatura Mondo“: „Ĝian valoron garantias la ĉefredaktoroj Julio Baghy . . .“

Karl Minor, L. K.

*HAEFKER, Hermann: *Jarmiloj pasas. Universala Historio. Verkita originale en Esperanto. Kun ses artaj reproduktaĵoj kaj dek unu geografiaj skizoj. Du volumoj. Köln 1930/31: Heroldo de Esperanto. Prezo: Duonlede bind. 16,— RM, unu volumo aparte 9,— RM, ambaŭ volumoj kune bind. 13,50 RM.* [948

Mia intereso pri mondhistorio ne estas granda, kaj sekve mi ankaŭ ne posedas grandan scion pri ĝi. Eble pro tio la legado de tiu ĉi belege eldonita kaj arangita verko estis por mi iom malfacila; eble tial nur erare mi havis la impreson, ke la stilo de la verko entute estas iom peza. Kelkfoje epizodoj, kiujn rakontas la aŭtoro, restis al mi malklaretaj, ĉar la aŭtoro ŝajne supozas tie pli grandajn sciojn, ol mi havas: do tie aliaj personoj eble havas pli grandan ĝuon, ĉar ilia jama scio plenigas la breĉojn. Krom tio, kompreneble, Haefker havas siajn „amatajn ĉevaletojn“, kiel diris Zamenhof, pri kiuj li okupiĝas pli detale, tiel donante pli multan gravecon al tiu tempero kaj aliaj, kaj ne pritraktante la tutan materialon per sama senpartieco. Sed: ĉu senpartieco rilate al mondhistorio estas ebla? Ĉu unu sola persono povas verki la idealan, senpartian libron pri mondhistorio, kiun bezonas la mondo, kaj kiujn devus donaci al ĝi E? Eble mi parolos pli-malpli detale pri tiu ĉi demando, recenzante la duan volumon de „Jarmiloj pasas“, kiun ĝis nun mi ne vidis. Ĉi foje mi ne povas ne esprimi mian ĝojon pri la elveno de la verko — ne atentante tiujn detalajn demandojn. Elvenis originala verko pri mondhistorio. Jen la fakto. Jen la tre grava fakto, pri kiu ni devas atentigi ĉiujn ne-E-istojn.

Vojagemulojn ni atentigu pri la prospektoj eldonitaj de ban- kaj kuraĉlokoj; al komercistoj ni montru la eldonaĵojn de la diversaj foiroj; sed se sciencistoj vidos, ke ni jam posedas originalan verkon pri mond-historio — apud ekz. „Per Balono al la Poluso“ kaj aliaj —, ili certe miros kaj ne povos kaŝi la impreson, kiun al ili faris tiu fakto. Jen la ega graveco de tiu ĉi verko por nia afero — graveco, apud kiu la demando pri la stilo, la sintakso ktp. povas nepre silenti.

Karl Minor, L.K.

**GLUCK, Julius, und Dr. Edmund SÖS, Vollständiger Lehrgang der internationalen Hilfssprache Esperanto. Für Kurse und Selbstunterricht. 31.—35. Tausend. Wien [1930]: Wallishaussersche Buchhandlung. Preis: 1,50 RM.* [935

